

## AVENO # 46 - AGADO de AVE kaj de AVEanoj - 2020

*provizora versio*

Jen ĝeneralaj informoj pri AVE kaj aliaj CSO-oj .  
Diversaj peticio-petoj troviĝas je Ekologio au je Homaj Rajtoj

Proponita kotizo por AVE estas: 10 EUR jare, pli au malpli eblas.  
Nia UEA-Konto: avex-z;

Konto de UEA:  
ABN-Amro Bank, Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam  
IBAN: NL66 ABNA 0426 0515 99, BIC/SWIFT: ABNANL2A  
Noto: (de "via nomo" por Kto. avex-z)

Elkoran dankon – Manfred Westermayer, la sekretario.  
Adreso: AVE, Kandelstr. 62, 79194 Gundelfingen/Breisgau, Germanio  
Retejo de AVE: <http://www.verduloj.org>  
Nia eta interreta diskutejo troviĝas je Ipernity, tie serchu la grupon "Verduloj"

Koncize: 2014 AVE kunvenis por festi la 30-jarighon:

Ni tradukis la Manifestojn 2014 de la Europaj Verdaj Partioj (trovebla sur [www.verduloj.org](http://www.verduloj.org))  
- Federacio de Junaj Europaj Verduloj  
- Europa Verda Partio: [europeangreens.org](http://europeangreens.org)  
– tutmonda asocio de verdaj partioj: [GlobalGreens.org](http://GlobalGreens.org)

Nova informejo: [kern.punkto.info/arkivo/](http://kern.punkto.info/arkivo/)

La projekto <http://www.lingvo.info> celas provizi informojn pri lingvoj kaj diskonigi plurlingvecon en la interreto ... La retejo estos havebla en almenaŭ 17 lingvoj ekde sia lanĉo.

Internaciaj Ago-Tagoj (nur kelkaj)

01-27 : Rememortago pri la kruelajhoj de la fashismo (liberigo de la koncentro-lagero Auschwitz)

02-21 : Internacia Tago de la Patrino Lingvo

03-08 : Internacia Tago por Virinoj

03-10 : Internacia Tago por la Autonomio de Tibeto

03-21 : Tago de la Mondcivitanoj

03-22 : Internacia Tago por la Akvo

04-20 : Tago de la Tero

05-09 : Europa-Tago

05-15 : Nakba-memortago pri la forpelado de araboj el la nov-fondita ŝtato Israelo (1948)

05-21 : Internacia Tago por la Kultura Evoluo

06-08 : Tago de la Maroj

06-11 : Internacia Tago de la Lingvoj

11-25: Internacia Tago malhelpi perforton kontraŭ virinoj kaj knabinoj

= = =

2020-11-30 Societo Bona Volo en Goma klopodas krei loghejojn por sen-patraj familioj de la kudrejo Mama Wimbi

Bonvolu vidi la novan retejon de SBV: [bonvolo.net](http://bonvolo.net) - tie vi vidos la laudindan agadon, ne nur instrui la kudro-metion,

sed ankaŭ utiligi ĝin por havigi enspezojn por la patrinoj - ili kaj/au iliaj infanoj estas esperantistoj.

Fakte necesas mono - kaj eble ankaŭ kontakto kun eksterlandanoj, por utiligi la lingvon.

Penny Vos estas la eksterlanda bazo de SBV.

AVE profitas de la loka kunlaboro inter Alphonse Waseka kaj Etienn Katchelewa kadre de la projekto „Akvo por Kalima“ kies organiza bazo devenas de SBV.

tiu projekto nun estas en la laboro, jam venis kelkaj fotoj kaj videoj, kun novaj akvo-kranaroj; raporto venos

kiam la laboroj estas faritaj.

Se vi volas subteni - ili aĉetos terenon (ne nur por loghejoj, sed ankaŭ por la salono de kudrejo kaj kunvenejo).

Por subteni tion ni petas donacojn - eblas al la UEA-konto de AVE: avex-z

Komento pri la arboplantado en Uvira: tio komencis, sed pro la kronviruso ne eblis fari tiom kiom eblas per la sendita mono. Raporto venos.

= = =

2020-07-21 speciala peto al niaj socialismaj geamikoj

Alvoko al kelkaj AVE-anoj kaj abonantoj de AVENO kiuj inklinas aŭ apartenas al socialismaj/maldekstraj partioj. En Tanzanio regas socialisma partio. Kiel vilaghar-estro Mramba apartenas al tiu. Verda Partio ghis nun ne ekzistas tie. Do, mi volonte kunlaboras kun Mramba direkte al la 17 CSE (Celoj de Daurigebla Evoluo) de UN. Kaj mi petas niajn maldekstrajn geamikojn subteni la balotokampanjon de Mramba, por denove esti elektita por 5 jaroj - li petis subtenon de 200 Euro. Vi povas transpagi al lia UEA-Konto: smba-n, aŭ al mia privata bank-konto (vidu sube). Koran dankon :)

--

2020-07 Dankon al pluraj kiuj subtenis Inna Valeshkovskaja de Esperanto-grupo Verdajho en Odessa. Shi havas komplikajn problemojn pri sia sango-sistemo, kaj nun klopodas trovi fakan konsulton de universitata kliniko en Freiburg - ni jam subtenis 2-foje per 450, aktuale restis 590 Euro. Sufichas por plia konsultado. Ramon jam konsultis konatan specialiston en Barcelono, kiu konsilis pri daurigo de serchado. Ni atendas pliajn pashojn kaj informos.

--

2020-07-21 Projektoj estintaj kaj estontaj - rearbarigo Niger, Tanzanio, DR Kongo dank' al kelkaj karaj geamikoj AVE povis subteni:

**Mazingira (TZ) projektoj de Mramba Simba:** rulseĝo por unu-gamba junulo (750), busha operacio de virino (250), subteni la novan kaj daŭre funkciantan necesejon (400) por la mezlernejo „Esperanto Secondary School“ en Marambeka - ĉar ne sufichis la subteno Mramba decidis redukti al 2 porda necesejo. Li ankaŭ ricevis 300 Euro por daurigi la rearbarigon de la monto Tirin'gati, kiu apartenas al la vilagharo, kies estro li estas.

### **Uvira - komenco de rearbariga projekto**

vi certe rememoris ke en Uvira, DR Kongo, okazis pluvego kiu kaŭzis inundojn kaj terglitojn, estis loka katastrofo, pluraj domoj estis detruitaj. Martin delonge celas rearbarigon, ĉar nur arbaro je la deklivoj povas teni la grundon kaj sorbi parton de la akvo. Nun li rekomencis la agadon, li rajtas uzi la terenon de eklezio por kultivi arbidojn kaj ankaŭ por komenci la plantadon. Li ricevis 400 USD de AVEanoj kaj unu alia subtenanto. Li certe bezonas multe pli, por sekurigi la plantitajn arbidojn kontraŭ bestoj kaj homoj.

### **Bunda - Tanzanio**

SYLIVESTER NICODEMUS NYINYIMBE li estas profesia arbido-kultivistoj proksime de Bunda, NW de Tanzanio. Li sekvas la konsilojn de Wangari Maathai - vidu verduloj.org - ke arboj necesas por protekti la grundon kaj havi ne nur akvon, sed bonkvalitan trinkakvon en la regiono. Krome al lia profesia vendado de arbidoj li volas rearbarigi ne-uzatan parton de sia tereno (6 akroj = ĉ. 3 hektaroj ?) kaj petas subtenon por tiu agado.

Mi metos (ghis dimanĉo) lian raporton kun multaj diversaj arbo-specioj al nia retejo: [verduloj.org/afriko.htm](http://verduloj.org/afriko.htm)

### **Niger**

Iliasou Boukari estas ĵurnalisto kaj vidas kiom en sia lando, kiu apartenas al la Sahel-zono, necesas rearbarigo. Okaze de la Festo por la sendependiĝo, 3-a de Augusto, oni plantas arbojn en la tuta lando. Li subtenas organizon kiu partoprenas la arboplantadon.

### **Finfine:**

Bedaurinde ni ne havas fonduson kiu kunlaboras pri tiuj rearbarigaj temoj, ĉar AVE ne estas registrita asocio. Tio signifas ke ni ne povas skribi formalan kvitancon kiu ebligas reduktion de via imposto. Se vi volas

subteni niajn samideanojn - rearbarigi għenerale au en unu el tiuj landoj - bonvolu donaci al la UEA-konto de AVE: avex-z  
au al mia persona konto che Volksbank Freiburg: IBAN: DE31 6809 0000 0007 8681 11, BIC: GENODE61FR1

Anticipe koran dankon,  
Manfred

= =

2020-06-12 AVE che la Reta 31-a Konsilio de la Europaj Verdaj Partioj dum tiu vendredo la konsilio estas malferma al Civil-Sociaj Organizajhoj (CSO/NRO) kiuj paralelas la verdajn temojn.

Oni ebligos tut-tagan ekspozicion. Fakte posttagmeze estas pluraj paralelaj sesioj. Kaj ekde 16:30 estas publika prezentado de elstaraj parolantoj kiel Vandana Shiva, Reinhard Bütikofer (MEP), k.a. Pri nutrada kaj sociala sekureco, defendo de demokratio, tutmondaj rilatoj (la gigantaj shtatoj)...

Teorie estus ebleco prezenti Esperanton, sed mi ne certas chu ni havas tiom da allogaj plurlingvaj paghoj/prezentadoj kiuj necesus.

Ni prezentis diversajn dokumentojn, i.a. en 10 lingvoj „Kial Esperanto por la Verduloj“ - fakte de la komenco de AVE 1984.

Ni havas multe da materialo sur nia retejo: [www.verduloj.org](http://www.verduloj.org)

<http://www.europeangreens.eu/>

= =

2020-05-11 Rearbariga projekto en Uvira, DR Kongo – UEA rekompensoprojekto ?

eble vi legis au audis pri la granda inundo antau du-tri semajnoj pro tro forta pluvego kiu trafis la urbon Uvira, je la norda rando de Tanganjika-Lago. Jen la raporto de Martin Fadhili Enzo, kiu komencis rearbarigan projekton en 2017 – pro atako de milico li devis fughi al Burundio; sed nun denove loghas en Uvira:

„Uvira post multaj jaroj spertas malbonan tempon de sia historio pro inundoj kiuj okazis la 17an-de aprilo-2020. Multaj homoj mortis, domoj detruitaj, pontoj falis, kaj aliaj perdis esperon por vivi en tiu parto de la urbo kie inundoj atakis. Multaj riveroj (Mulongwe, Kavimvira, Kiliba, Shange, Runingu,...) inundis. ni devas trovi daŭrajn solvojn kaj daŭrigi kun mia antaŭa projekto (la rearbarigo en Uvira) . Ĉar multaj montoj falis en la litoj de la riveroj, kaj tio faris ke la riveroj lasis siajn kutimajn litojn por trovi aliajn vojojn kie ili pasis. ...“

Por la nova projekto Martin kunlaboras kun eklezio kiu garantias la formalan bazon de tiu projekto. La detalan planon mi volonte sendos al tiuj kiuj pretus subteni. Entute necesas 5 mil Euro.

Ni esperis ke la CO2-kompensiga projekto de UEA kreos fonduson el kiu eblas financi tiajn projektojn. Bedaurinde la UK estis prokrastita, kaj mi ne plu trovas la fonduson sur la retejo de UEA. Pro tio decidis kolekti flanke de AVE-anoj kaj aliaj samideanoj por tiu projekto.

Por tiu projekto mi donos 200 Euro. Mi petas vin aldoni iom – lau viaj eblecoj.

Vi povas transpigi al la UEA-konto de AVE: avex-z – bonvolu noti „Uvira rearbarigo“ kaj vian nomon.

au al mia bank-konto (kiun mi sendos kun la dosiero).

Mi volas transpigi komence de Julio la unuan pagon.

2020-04 nova Baza Programo de la Verda Partio en Germanio

la diskuto pri tiu aktualigo pro la Korona-pandemio nun okazas chefe interrete – pagharo: „Netzbegrünung“ - sur la retejo oni listigas la aktualan staton:

<https://www.gruene.de/artikel/alle-informationen-zum-programmprozess>

En „Netzbegrünung“ lastjare mi instalas la temon "Esperanto" - intertempe pluraj partoprenis per demandoj kaj ankaŭ pozitivaj spertoj.

Mi serchis „Sprache“ kaj kontrolis en la aktuala malneta teksto (de 2019-03) de la nova Baza Programo (GP 2002) , kaj opinias ke estis malpli klara (ol tiu de 2002) rilate niaj postuloj:

1. ( GP 2002, p. 110 )

respekti lingvon de autohhtonaj - jam delonge loghantaj en iu regiono - minoritatoj (ekz-e sorboj)

2. ( GP 2002, p.158 )

„... bis hin zu den übernationalen Sprachen.“

= =

2021 Tutmonda kaj Azia Verdpartiaj kongresoj en Seoul korpe rete.

En 2021 denove okazos tia kongreso (tutmonda kaj kontinenta) post Liverpool 2017. AVE partoprenis chiujn (ekde 2001) dank al kunlaborantoj el pluraj landoj (alfabete: AR, AU, BR, DE, EE, GB, NL, SN).

Sur la retejo de GlobalGreens vi trovos la informojn pri Verdaj partioj en via kontinento (en la retejo de kontinentaj federacioj) – bedaurinde nur en 5 europaj lingvoj.

<https://www.globalgreens.org/forms/global-greens-5th-congress-session-proposal-form>

Samtempe okazos la kongreso de la Aziaj Verdaj Partioj ( [asiapacificgreens.org](http://asiapacificgreens.org) )

= =

2020-03-04 Kalima trinkavo progresas – Korona viruso ankau – ni esperas bonan finon

La korona viruso etendighas en preskau chiu landoj - kun diferencoj pro la kulturo, kvoto da maljunuloj, populacia denseco, san-sistemo kaj malfermeco au diktatura politiko (kie la regantoj preferas kashi la veron).

Intertempe kreskas la nombro de tiuj kiuj re-sanighis de la viruso, kaj esploristoj tutmonde serchas rimedojn (ekz-e jam konatajn medikamentojn kontrau Malario k.t.p.) kaj vakcino-manieron. Mi esperas ke la monda socio resanighos iom-post-iom.

**Indas raporti pri pozitiva afero:** La fonduso de la germana shtato subtenis nian trink-akvo-projekton en Kalima, DR Kongo - per preskau 50 mil Euro. Dank al la fonduso de dungitoj de Robert Bosch (tutmonde konata pri elektrikaj kaj elektronikaj iloj) donacis 13.500 kaj niaj samideanoj (AVE-anoj kaj aliaj) kolektis preskau 5 mil. Intertempe plejgranda parto de tiu kolekto (70.585 USD) atingis niajn amikojn Etienne kaj Alphonse en Goma, kie ili aĉetos la teknikajn materialojn. Koncize: Etienne planis kaj gvidos la konstru-laboron, oni konstruos akvo-prenilon el montara rivereto, kaj 5 pliaj kvartalajn kranarojn. Krome ni esperas subtenon de dungitoj de alia firmao por 2 pliaj kranaroj. Tiam 2/3 de la urbo ricevos salubran trinkakvon en distanco de ghis 300m. Denove koran dankon al chiu donacintoj :)

Bondezirojn, restu sane, amike, manfred

= = =

2020-03-18 trinkakvo-projekto en Kalima (DR Kongo)

Koran dankon al niaj subtenantoj :)

Por tiu projekto ni nun ricevis la akcepton de la shtata fonduso (preskau 50 mil Euro), kiu subtenos la daurigon de tiu projekto provizi tutan urbon per salubra trinkakvo. Dank' al la subteno de Janek kiu akiris subtenon de firmao fonduso, krome per pluraj grandaj kaj malgrandaj donacoj de AVEanoj en Februaro ni atingis la sumon de 16.100 Euro. Nia parto (deviga estis 25%, kaj maksimume 50 mil) de la projekto estos 18.100 kaj nun

**necesas kolekti la reston de 2.000 Euro** por realigi la grandan projekton en Kalima.

= =

2020-02-12 Ipernity & Esperanto

Eble vi mem uzas Ipernity por montri viajn fotojn au por viziti aliajn foto-prezentadojn.

Dum pluraj jaroj Ipernity ofertis Esperanton kiel laborlingvo. Kiam Ipernity havis malfacilajhojn (ĉar ne profitas de la uzantoj), grupo da interesuloj savis Ipernity, kreinte asocion IAM kiu nun viv-tenas Ipernity. Bedaurinde inter ili ne estis esperantisto, kaj ili devis redukti la elspezojn, kaj pro tio ili rezignis pri Esperanto.

Mi demandis la asocion, kaj fakte ili pretas oferti Esperanton denove, se ni garantias minimuman nombron

da klubanoj. La kotizo por normala klubano estas 22,90 Euro por uzi malgrandan datumo-spacon. Lau aktualaj informoj estas 360 homoj kiuj uzis Esperanton kiel laborlingvo, malmultaj estas denaskaj esperantistoj.

Sed nur 12 (au 13) estas pagantaj klubanoj. Ni devus esti 40 por reale montri nian intereson.

UEA subtenas niajn klopodojn, sed preferus ke estas sufiche multaj uzantoj kiuj pagas.

Se ni sukcesos - restas iom da laboro traduki la novajn tekstojn en Esperanton.

AVE delonge uzas Ipernity kiel informilo ekster nia retejo – eble ni ne sufiche varbis por tio. Aliflanke nia Fejzbuka informejo (dank al Neil ?) eble estas pli facile atingebla.

Se vi ghis nun ne uzas Ipernity – eble serchu „Esperanto“ au „Verduloj“ au „Naturamikantoj“ – estas multaj interesaj fotoj el la tuta mondo tie – „Universala Esperanto-Asocio“ estas klubano, sed evidente delonge ne plu aperigas ion tie.

Do, se vi uzas Ipernity – bonvolu pripensi chu vi povas igi klubano (je jaraj kostoj de 22,90 Euro).

---

2020-01-31 Klimato-fonduso de UEA – kompensado de CO2-eligoj

Delonge UEA klopodas agordi al daurigeblo, diversaj prelegoj, ekz-e de la pasinta prezidento profesoro Mark Fettes demonstris ties neceson. Dum la UK en Lahti – lau la prelegoj pri la kongresa temo – venis la ideo kompensi la eligitan CO2 okaze de flugoj (principe ankaŭ de alvojaghoj per automobilo). ja ekzistas organizoj, kiel Atmosfair.de, kiuj organizas plantadon de arbaroj.

De niaj geamikoj en kelkaj afrikaj landoj (ekz-e Tanzanio, Benin, DR Kongo) ni scias, ke ili jam komencis rearbarigojn projektojn en sia regiono. La avantaĝo subteni iliajn projektojn estas ke ghi montros ke Esperanto ne nur parolas, sed ankaŭ agadas en dauripova direkto.

Do, se vi partoprenas Esperanto aranĝojn kaj devas flugi – au veturi per propra automobilo - bonvolu pripensi pri via kompensado.

Ekzemplo:

Atmosfair.de kalkulas ke flugo tien-reen de Frankfurt – Montreal – Frankfurt kauzos 2.500 kg da CO2 (en la simpla klaso), por tiu-chi vojaĝo de unu persono ili proponas kompensan pagon de 59 Euro.

Nun eblas kompensi kaj samtempe subteni agadon de samideanoj (rearbarigo, renovigo de la UEA-domo ke ghi bezonos malpli da energio)

Jen la UEA-konto: [www.uea.org/alighoj/donacoj/co2](http://www.uea.org/alighoj/donacoj/co2)

= =

2020-01-21 Kaso-raporto de AVE por 2019

En nia listo de membroj kaj aliaj abonantoj kiuj ricevas AVENO-n estas 290 homoj, adicie 2 kiuj ne uzas retadresojn.

La kostoj de AVE estis 69 Euro por UEA kaj por nia kunveno en Lahti.

Entute 21 personoj libervole pagis la kotizon (ek de Novembro mi proponis 10 Euro jare): por 2019 estis 135, kaj jam por 2020 estis 75 Euro. Koran dankon :)

Adicie AVE ricevis kelkajn grandajn donacojn por nia Per-Esperanto Agado:

1175 Euro, de chi-tiu estis 300 por la rearbarigo (monto Tinin'gati de la projektaro Mazingira de Mramba Simba). Koran dankon al tiuj kiuj nutris ghin :)

Por la trinkakvo-projekto en Kalima (DR Kongo) ni transpagis jam 875 Euro; krome al tiu venis pli da mono rekte al la germana asocio kiu subtenas nin organize. Dank' al tio kaj al la subteno de Janek kiu akiris subtenon de firmaa fonduso, krome per la sekva pago en Februaro (400 Euro de AVE) ni atingos la sumon de 15.500 Euro. Mi ankaŭ esperas la subtenon de fonduso de la germana ministerio pri ekonomia kunlaboro (49.900). Nia parto de la projekto estos 17.900 kaj nun

**necesas kolekti reston da 2.400 Euro** por realigi la grandan projekton en Kalima.

Eble vi demandos, kion ni faru se la shtata fonduso ne volas subteni tiun projekton ?

Unue, mi klopodos eltrovi kiel tamen eblas atingi la akcepton.

Due, en la kazo de finfina malsukceso, ni uzos la monon por etendi la jam konstruitan parton de la reto al 2 pliaj kvartalaj kranaroj. Sed tiam necesus ke la diurna kvanto da akvo po familio estu limigita je 15%; ĉar la fonto estas je la limo de sia kapacito, donas salubran trinkakvon akvon por 17.000 homoj.